# TEJO-aktuale: numero 335, 2012-11

### La Esperanta eldono de "La rakonto pri Kjeŭ" nun mendebla ĉe la Libroservo de UEA

En la Hanoja UK estis prezentita la Esperanta eldono de "La rakonto pri Kjeŭ", unu el la plej gravaj verkoj de la vjetnama literaturo. Nun vi povas mendi ĝin ĉe la Libroservo de UEA. Legu pli: http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8870

### Iberia Renkontiĝo 2013, Madrid, Hispanio, 15a ĝis 17a de marto 2013

La venonta Iberia Renkontiĝo okazos meze de la Iberia Duoninsulo, en Madrid, inter la 15a kaj la 17a de marto 2013.

Ni atendas vin ĉiujn al amuza kaj vere MJSa etoso kie renkontiĝos homoj en pluraj popoloj de nia peco da tereno inter la Atlantiko kaj la Mediteraneo: galegoj, valencianoj, katalunoj, leonanoj, portugaloj, manĉanoj, ktp ktp. uzante ĉiuj Esperanton, do ni ankaŭ bonvenigas partoprenontojn el aliaj landoj!!

Retpaĝo nun je redaktado. Pliaj informoj: IRoMadrido2013 ĉe gmail.com aŭ https://www.facebook.com/events/231813830280788/

Venu kaj ĝuu!! Hispana Esperanto - Junulara Societo (HEJS)

### IJF 2013, Ostuni (Brindisi), Italio, 27a de marto ĝis 2a de aprilo 2013

Elektitis la sidejo por la IJF 2013: ĝi okazos en Ostuni (Brindisi), kiu estas bela loko, vere tre bela. Plej baldaŭ ĉiuj informoj donitos kaj ni alkroĉos fotojn de la festivalejo. En onta ĝisdatigo ni diros kiam eblos aliĝi. Ĉio ĉi malgraŭ ke ĉiuj Majaaj antaŭvidoj kontraŭas nin. Legu pli: https://www.facebook.com/events/149023481906924/

### Roskilde Festivalo 2013, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 8a de julio 2013

Partoprenu senpage en la plej granda muzikfestivalo de Eŭropo! DEJO invitas vin de vendredo la 28-a de junio ĝis lundo la 8-a de julio. Vizitu http://roskilde.festoklubo.dk/rf13.

La Roskilde Festivalo dum pli ol 40 jaroj okazadas en Roskilde, Danujo, kaj nuntempe havas 110 000 partoprenantojn, el kiuj 27 000 estas volontuloj. Kaj el tiuj 27 000 volontuloj, ĉirkaŭ cent (espereble) estos esperantistoj.

Vi kiel volontulo laboros kvarfoje 8 horojn, do 32 horojn dum la tuta semajno. Ni donas bazejon kun sofoj, senpagan manĝon dum tuta semajno, tendojn kaj limigitan kvanton da matracoj kaj dormsakoj. Se vi volas privatecon, kunportu propran tendon.

### Produktiĝis jam pli ol 10 mil ekzempleroj de Poŝamiko

En oktobro 2012 eliris el la presejo al la 7a eldono de Poŝamiko. La furora libreto nun produktiĝis en 2500 ekzempleroj, kaj tiel la suma eldonkvanto de ĉiuj eldonoj superis 10 mil. La libro plurfoje staris je la unua loko de la UEA-vendolisto, kvankam UEA estas ne la nura distribuanto. Legu pli: http://edukado.net/novajhoj?id=278

### Vinilkosmo nun havas grupon ĉe Facebook

Aliĝu al la grupo: http://www.facebook.com/groups/39680802191/

### Nova eldono de Esperanto Ilustrita aperis

Esperanto Ilustrita - La Virtuala Revuo de Esperantujo

Portugallingve: http://esperantoilustrado.blogspot.com.br

Esperante: http://esperantoilustrita.blogspot.com.br

## La Riverego n-ro 109 aperis!

Jen la 109-a numero de La Riverego, bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia (lingvoj: Esperanto [ĉefe] kaj la franca). En tiu ĉi numero ni komencas serion de artikoloj pri nia trisemajna vojaĝo al Japanio. Eble vi trovos La Riveregon interesa kaj utila! Legu pli: http://www.esperanto.qc.ca/en/riverego

## [Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo] Jen vigla kanto pri koloroj

*Malsukcesa elŝuto.*

## Venontaj renkontiĝoj

2-a BIERo, Žatec, Ĉeĥio, 9a ĝis la 11a de novembro 2012 http://mladez.esperanto.cz/?p=1087&lang=eo

La 37-a Malferma Tago de la Centra Oficejo, Rotterdam, Nederlando, 27a novembro 2012, https://www.facebook.com/events/468565676521636/ kaj http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=476#1

KLERIGKURSO, STUDSESIO ĉe Germana Esperanto-Centro en Herzberg, Germanio, 14a ĝis 16a de decembro, http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937

Eŭropa rendevuo de Stella, Stella-Plage, Nord-Pas-de-Calais, Francio, 17a de novembro 2012, http://esperanto.nord.online.fr/eo/stella/index.htm

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de

Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo

31a Komuna Seminario 2012, "Takaonomori Wakuwaku Village" apud Monto Takao, en Urbo Hachioji en Tokio, Japanio, 28a ĝis 30a de decembro 2012, https://sites.google.com/site/komunaseminario2012/esperanto

4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013, http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl

4-a NOVA - Novjara Aranĝo, Praia da Pipa, RN (Norda Riogrando), Brazilo, 3a de januaro ĝis 6a de januaro 2013, http://novjaraaranĝo.wordpress.com / (atentu: g x estas ĝusta retadreso)

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu